

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Unesko prilumita!

### Hama-Ronda Vespero pri Unesko

nov. 21, 17h00-19h00, en Tikyuu-Plaza (Tergloba Placo) en Jokohamo

Ĉeestis 15 personoj (inkl. la prelegantojn).

Nia rondo, nome NPO Esperanto Jokohamo, okazigis kunvenon dediĉitan al pli da kompreno pri Unesko. Kadre de nia “Hama-Ronda Vespero”, ni temis pri Unesko, nome La Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, per 2 prelegoj japanlingvaj. La motivo estas la ĉi-jara UEA-kampanjo “Montevideo 60”.

La prelegaron enkondukis s-ro Doi Hirokaz per la supra motivo, kaj s-ro Sibayama Zyun'iti prezentis novaĵon, ke la ĉi-jara Ĝenerala Konferenco de Unesko nomumis 53 personojn aŭ aferojn omaĝotajn en 2016 kaj 2017, kaj inter ili estas L.L. Zamenhof, mortinta en la 17a de aprilo 1917.

Unue parolis s-ro Suzuki Keiichiro, nia rondano kaj prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, pri Unesko kaj Esperanto, kun jena enhavo.

“La unua agnosko de Esperanto estis la Montevidea rezolucio de Unesko en 1954, kaj tial nun okazas la kampanjo Montevideo 60.

Poste sekvis rezolucio en 1985, kaj flanke de Esperanto, oni kontribuis al la celo de Unesko i.a. per Serio Oriento-Okcidento, la literatura serio tradukita en Esperanton. En la lasta oktobro, okaze de la 102-a Japana Esperanto-Kongreso, Unesko estis unu el la temoj de publikaj prelegoj.”

Sekvis parolo de s-ino Takayama Chieri, ĝenerala sekretario de la Asocio por Unesko en Jokohamo, kun jena enhavo.

“Kvankam Unesko mem estas inter-registara organizo, ĝin subtenas kaj ĝian celon apelacias ne-registaraj organizoj, kaj nia Asocio estas unu el ili. Praorganizoj de Unesko estis la Internacia Komitato pri Intelekta Kunlaboro sub Ligo de Nacioj, establita en 1922. Ĝia agado ŝrumpiĝis pro la Dua Mondomilito, sed postmilite jam en 1946, oni fondis novan organizon Unesko. Tion aŭdinte, kelkaj japanaj intelektuloj havis intereson, kaj en Japanio, precipe en urbo Sendai, naskiĝis ne-registara movado por Unesko, kio pli fruis ol ŝtatnivela aliĝo de Japanio al Unesko. Nia asocio estas unu el la

### Kun koloraj fotoj, via artikolo petata!

Tiu ĉi bulteno estos kolorplene presita en januaro. Ne perdu tiun ŝancon por aperigi vian eseon kun fotoj! Modela artikolo estas kun 2000 literoj kaj 2 fotoj, sed ni akceptos alitipajn artikolojn. Se tamen tro da artikoloj alvenus, permesu al ni meti ilin en postaj numeroj kun nigreblankaj fotoj. (Sibayama Zyun'iti, Redaktoro)



membroj de la Nacia Federacio de Unesko-Asocioj en Japanio, kaj agadas naciskale laŭ tiu Federacio, kaj tamen en la urbo ni memstare agadas. Unu el la ĉefaj agadoj de la Federacio fokusiĝas en eduka kampo, ekzemple kun la devizo Edukado en Daŭripova Evoluigo (angla siglo: ESD), helpas evoluantajn landojn, aŭ enlande promocias la programon de lernejoj agnoskitaj kun Unesko-celaj edukprogramoj. La problemo ĉe nia loka asocio estas la maljuniĝo

de la ĉefaj aktivuloj.”

Post tiuj prelegoj, s-ro Suzuki aldone prezentis la staton de la Unesko-Asocio en Sendai, unu el la pioniraj NGO-rondoj, ne nur japanie, sed monde. Iam Sendai-Esperanto-Societo okazigis Esperantan kurson en la sidejo de tiu asocio. Pri tio li lernis de la prelego de la aktivulo de Unesko-movado, okaze de la prelego en la 102-a Japana Esperanto-Kongreso ĝuste en Sendai.

## Jokohamo invitis la kongreson!

Ni, Esperanto Jokohama proponis inviti la 104-an Japanan Kongreson al nia urbo, en 2017, kaj tio estis akceptita. Okaze de la Fermo de la 102-a Japana Kongreso en Sendai, ni faris invitoparolon kiel jene. Dum la parolo, niaj rondanoj staris en la halo.

### Invitoparolo al la 104-a Japana Kongreso

Saluton!

Ni estas membroj el la loka Esperanto-rondo en Jokohamo. Prezentas mi, Nanba Fumiharu, unu el la komitatanoj de la rondo.

Lastajare, nia rondo, eksa nomo estis Jokohama Esperanto-Rondo, decidis renaskigi nin kiel Ne-Profitcela Organizo laŭ japana juro de jura persono. Japanlingve, NPO 法人.

Kaj en la lasta printempo, nia rondo renaskiĝis en la nomo Ne-Profitcela Organizo Esperanto Jokohama. Ni volas daŭre agadi kun socia respondeco kiel NPO, kaj plu prosperigi nian taskon. Pro tio ni invitis la kongreson. Kaj oni decidis ke Jokohamo estos Kongreso-Urbo post du jaroj!

Nun, temas pri nia urbo Jokohamo.

En Jokohamo, ni okazigis lastfoje Japanan Esperanto-Kongreson en 2005, antaŭ 10 jaroj. Post tio, dum 10 jaroj, Jokohamo daŭre aspektas kiel havena urbo. Ne tre ŝanĝiĝis: Kvarthalo Minato-Mirai, Oosanbasi, Mara-Turo, olda ŝipo Hikawamaru kaj tiel plu situas same kiel antaŭ 10 jaroj.

Sed tamen, post la granda tertremo, ni rondanoj ekkonis kaj resciiis...

En la centro de Jokohamo, estas kelkaj obstinaj

malnovaj konstruaĵoj laŭ larĝa strato. Ekzemple gubernio-oficejo de Kanagawa, dogano de Jokohamo, hotelo New-Grand kaj tiel plu. Verdire, ili estas rezultoj de la rekonstruado post granda tertremo nomata Kantoo-Daisinsai, antaŭ ĉirkaŭ 90 jaroj.

Kiam vi vizitos kaj ekskursos nian urbon Jokohamo, bonvolu rigardi ilin en tia vidpunkto. Ni rekomendas.

Fine, ni rondanoj baldaŭ komencos preparadon por la Japana Esperanto Kongreso post du jaroj. BONVENON al Jokohamo! Ni atendas vin ĉiujn!

Dankon.


Nanba Fumiharu



## **NIAJ PLANOJ**

### **La jarfina festeno**

dec. 19, post la kutima lernokunsido, ĉe ĉina restoracio Fukuyoken en la Ĉina Kvartalo.  
Kotizo: 4500 enoj.



### **La ĝenerala kunsido**

jan. 31, 14h00-17h00, ĉe Kanagawa Kenmin-Sentaa

La plej supera decidorgano de nia rondo, por resumi agadon kaj kason de 2015, kaj lanĉi agadplanon kaj buĝeton de 2016. Plie diskutota estos pri la Japana Esperanto-Kongreso en nia urbo en 2017.

### **Prelego en Jokohama Internacia Forumo**

feb. 7, 11h00-11h50, ĉe JICA-domo en Jokohamo

Ni havos ŝancon prelegi antaŭ publiko interesiĝanta en internacia popola amikiĝo. Esperanton prezentos 3 el niaj estraranoj: s-ino Miyazaki, s-ro Fuse kaj s-ro Nanba.

## **Niaj Klasoj kaj Kursoj**

Okazas jenaj klasoj (ĝenerale en Kanagaŭa-Kenmin Sentaa)

\*Regulaj Klasoj en sabato:

(1) Klaso por legado de “Hispana, Kataluna, Mangada...” finita. Poste oni legos la paroladon de Zamenhof en la 1-a UK (1905)./(2) Jokohama Salono. 2 fojojn oni legas el libro: “Vizaĝoj” / (3) Daŭriga kurso

\*Regulaj Klasoj en merkredo:

(1) Oni legas “La Zamenhof-Strato” de Roman Dobrzyński./ (2) Daŭriga kurso; legata libro estas “Karlo”.

## **Venis Karto!**

**de ges-roj Trevor kaj Katja Steele el Aŭstralio**

*Karaj gesamideanoj de Jokohamo,  
ni elkore dankas pro la sendo de via  
bulteno “Novajoj Tamtamas”, kaj ni  
deziras al vi sukceson en via varbado  
por nia kara komuna lingvo, unu el la  
plej bonaj aferoj de la mondo.*

*samideane viaj*

*Trevor kaj Katja*

## **Tie estas nia “Novajoj Tamtamas”!**

En la oficejo de Flandra Esperanto-Ligo (en Antverpeno en Belgio), estas fakoj por gazetoj el la tuta mondo, kaj inter ili estas por nia bulteno. La Ligo estas fama kiel la eldonejo de “Monato”, sendependa gazeto esperantlingva. La foton liveris s-ro Doi Hirokaz, dum postkongresa vizito en Belgion.



---



---

## Eseo

---



---

### Tago de Eroŝenko en *Sight World*

Murata Kazuyo

#### La ekspozicio

Projekto “Eroŝenko 125” havis ŝancon organizi eventon “Tago de Eroŝenko”, okaze de *Sight World* 2015, kiu okazis en la 1-a ĝis la 3-a de novembro en la kvartalo Sumida en Tokio. La *Sight World* estas granda evento kun ekspozicio por blinduloj, kiun multaj koncertatoj el la tuta lando vizitas por havi informon pri la vivo de blinduloj. Tio daŭre okazas jam 10 jarojn. Ĉi-jare dum la tri tagoj 4950 personoj vizitis la ejon. Diversaj kompanioj (entute 42), kiuj produktas ilojn por blinduloj ekspoziciis, ekzemple komputilon por brajlo, grandigilon de literoj, aŭ hejma-elektraĵon k.a. Krome oni prezentas hundon por blindulo, aŭ volontulan agadon, ktp.

En la alia etaĝo okazis diversaj eventoj, prelego, simpozio, aŭ sperto pri akupunkturo aŭ masaĝo.

Ili estas tre enhavriĉaj kaj utilaj ne nur por blinduloj sed al ni ĉiuj, kiuj fariĝos malfortuloj je vidkapablo. Mi rekomendas al vi nepre sperti en la venonta jaro. (Okazos de la 1-a ĝis la 3-a de novembro en la sama loko)

#### Tago de Eroŝenko

En la 3-a tago, ni faris kurseton de Esperanto, du prelegojn pri Eroŝenko faritajn de s-roj Hikita Akio kaj Kishi Hiromi, kaj

koncerteton de balalajko.

Krome estis ekspozicio pri Esperanto, en kiu oni prezentis la figuron de Eroŝenko faritan de instruistoj de blindula lernejo. Dume mi vendis la memorlibrojn de Eroŝenko 125 (23 ekzempleroj estis venditaj). Kaj ni ekspoziciis rarajn materialojn; brajltaĵpilon samspecan al tio, kiun Eroŝenko uzis iam, tuŝeblajn bildlibrojn por blindaj infanoj, kiujn eksterlanda blindula asocio esperantista sendis al nia projekto.

Super nia antaŭjuĝo, venis pli ol 130 personoj (inkluzive de 24 esperantistoj) en la ĉambro, kaj mankis materialoj por prelego. Do nia celo, diskonigi Esperanton kaj Eroŝenkon inter blindula mondo bone sukcesis, danke al kunlaborantoj.



fotoj de s-ro Negisi Nobuki



#### Voĉlegita en retradio

Verko de nia membro, s-ino Murata Kazuyo, estis voĉlege prezentita en 3ZZZ, reta radio-elsendo. Temas pri “Mezvoja raporto pri Projekto Eroŝenko 125”, aperinta sur “Ponteto”, la organo de Esperanto-Ligo en Regiono Kantoo, n-ro 273. Ĝin legis 3ZZZ, aŭdebla de:

<http://melburno.org.au/3ZZZradio/2015/11/23/elsendo-de-la-23a-de-novembro-2015/>